Baltiaj Esperanto Tagoj
ŠIAULIAI

# SAGISTO

Redakcia retadreso: **ds@esperanto.lt**
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET43

ĈIUTAGA INFORMILO DE **BET-43** **N-RO 5** | 2007 07 19, ĴAŬDO

## KONCERTOJ

Antaŭhieraŭ vespere, marde, la 16an de julio okazis du tradiciaj koncertoj de BET. Unue koncertis flutistino Lidija GOMOLICKAITĖ-GRUDZINSKAITĖ kaj ŝian fajnan flutadon akompanis belvoĉa deklamado de poemoj fare de Marius DYGLYS. Al ambaŭ transdonis Jūratė PUPŠTAITĖ dankleteron nome de la dekano de la fakultato de sociaj sciencoj de Šiauliai Universitato d-ro Teodoras TAMOŠIŪNAS.

La alian koncerton faris la ensembleo "Animo" el Liepaja, Latvio. La koncerton energiplene gvidis Austra PUMPURE. Entute 14 personoj gitare prezentis latvajn kaj divernaciajn kantojn en Esperanto kaj foje en la latva. Kvankam la gvidanto laŭtdiris komence "Ni ne havas voĉon, sed koron. Homoj sidiĝu proksime de la scenejo," ja evidentiĝis, ke ili havis ne nur koron, sed ankaŭ voĉon, despli animvekan.

















## Komunaj ludoj





Lunde je 15:30-17:30 okazis “Komunaj ludoj por BET-anoj”. Ĝin vervoplene gvidis Nora CARAGEA el Germanio, unu el la plej aktivaj partoprenantoj de BET. La ĉeestantoj grupiĝinte amuze ludis sub ŝia lerta gvidado kaj helpe de Gražina OPULSKIENĖ.

La ludoj estis kompreneble lingvaj. Reprezentanto de la grupo desegnis, kaj la ceteraj devis diveni ĝuste la desegnaĵon.

## Esperanto kaj interreto




Jam ne eblas eĉ imagi pri Esperanto sen interreto. Ja interreto nekredeble kontribuas al la viva ekzisteco de Esperanto. Marde, la 17an de julio kadre de Somera Universitato okazis prelegoj pri “Esperanto kaj Interreto” kaj pri “Reta projekto Lernu”.

Ilin devis fari respektive Peter BALAZ kaj Jevgenij GAUS, sed pro ilia neeblo la samtemajn prelegojn faris Yves NEVELSTEEN.

Yves prelegis ankaŭ pri “Komputeko” kaj “Vikipedio” kun praktika trejnado pri Vikipedio merkrede vespere.

## Literatura kvizo





Neniu povas nei grandajn meritojn de Halina GORECKA kaj Aleksander KORĴENKOV por la nuntempa literatura aktivado de Esperanto. Ili kaj Tuomo GRUNDSTROM gvidis la literaturan kvizon marde je 11:00-12:00 en la 17an de julio. La ĉeestantoj profitis bonan okazon plisciiĝi pri la literaturo, verkistoj kaj tradukistoj de Esperanto.

## BET en Televido



Marde, la 17an de julio, la loka televido Šiauliai intervjuis la prezidanton de la organiza komitato de BET-43 kaj de Litova Esperanto-Asocio Povilas JEGOROVAS. Krome nemalmultaj gazetoj informis pri BET-43, kaj pri tio sekvos aparta raporto en alia numero de “SAGISTO”.

## KIO OKAZOS HODIAŬ

### 19an de julio (ĵaŭde)

09:00–11:00 Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj
*Aŭditorioj 6, 8, 9 kaj 15*

09:00–11:00 Somera universitato. Prelegoj de Vytautas ŠILAS "Esperanto en Vilno ĉe la sojlo de XIX-XX jarcentoj" kaj Lydia LINDLA "Koloroj de Japanio"
*Aŭditorio 17*

10:00–11:00 Baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo. Prelego de Petras ČELIAUSKAS
*Aŭditorio 10*

11:00–12:00 Demonstrado de filmoj. Gvidas Genovaitė LIEPINIA
*Aŭditorio 7*

12:00–14:00 Tagmanĝo

14:00–16:00 Katolika Diservo en Esperanto. Celebras katolika pastro Valerijus RUDZINSKAS
*En la urba Katedralo*

16:00–18:00 Somera universitato. Prelegoj de Petras ČELIAUSKAS "Lingvaj eraroj farataj de litovaj esperantistoj" kaj Raita PYHALA "Diapanoramo pri Laponio"
*Aŭditorio 17*

18:00–19:00 Koncerto de naciaj muziko kaj dancoj. Ensembloj "Šelmiai" kaj "Vajaunas"
*Ĉefsalono*




***Ĉu lasi plu nian "SAGISTO"-n fotogazeto? Ankoraŭ restas du numeroj por ŝanĝi. Bonvenas viaj kontribuoj.***

## ABONU

### "Litova Stelo" por Vi




Jam dekokan jaron sur Esperanta firmamento denove lumas la revuo renaskiĝinta "Litova Stelo". Aperas 6 numeroj jare kaj ĉiu po 32 paĝoj plus koloraj kovriloj. Ĉiuj tekstoj estas en simpla Esperanto kaj ne nur pri Litovio. Ĉi tie vi trovos diverstemajn artikolojn, inkluzive esperantologiajn, originalan kaj tradukitan beletron, distrajn paĝojn ks.

Ankaŭ vi mem povas kunlabori sendante materialojn; ni volonte publikigos artikolojn pri via lando kaj klubo, pri la Esperanto-movado kaj pri aliaj temoj.

Do ni rekomendas al vi aboni revuon "Litova stelo" dum BET-43. Sendepende de abontempo ĉiuj ricevos plenan jarkolekton. Vi povas aboni ĝin ankaŭ pere de perantoj, kiuj estas en 18 landoj, pere de la libroservo de UEA kaj rekte ĉe redakcio de "Litova stelo" aŭ en oficejoj de Litova Esperanto-Asocio en Kaunas kaj en Vilnius. Ĝenerala abonprezo estas 14 eŭroj jare. Orient-eŭropaj kaj ekssovetiaj landoj havas konsiderindan rabaton. Pri ĉiuj demandoj informiĝu rekte ĉe funkciuloj de Litova Esperanto-Asocio aŭ laŭ retadresoj litova.ea@mail.lt aŭ litovastelo@takas.lt.

### La Ondo de Esperanto

La Ondo de Esperanto estas internacia sendependa magazino en Esperanto. Ĝi aperas ĉiumonate sur 24 paĝoj kaj estas riĉe ilustrita kaj eldonata en Kaliningrado (Ruslando). La Ondo de Esperanto faras specialan oferton pro BET-43:

*A1. (Baza) Por la tuta jaro 2007 aŭ 2008* — *96 lidoj*
*A2. (Baza) Por julio-decembro 2007* — *49 lidoj*
*B1. (Orient-eŭropaBaza) Por la tuta jaro 2007 aŭ 2008* — *55 llidoj*
*B2. (Orient-eŭropa) Por julio-decembro 2007* — *28 lidoj*
*C. Elektronika abono (pdf)* — *40 lidoj*

La kotizojn akceptas Halina GORECKA kaj Aleksander KORĴENKOV.

## ANONCOJ

### Viajn impresojn atendas

Kiam viaj impresoj ankoraŭ ne forvaporiĝis, fiksu ilin sur papero. Estas interese, kiel al vi plaĉis ekskursoj, prelegoj, koncertoj kaj kursoj. Do kaptu vespere aŭ tage liberajn minutojn, skribu kaj transdonu al la redakcio de "SAGISTO". Viajn impresojn laŭeble aperigos "SAGISTO" kaj ankaŭ "Litova Stelo".

### Atentigo pri ekskurso

Hodiaŭ okazos nur ekskurso al Monto de Krucoj kaj vendrede (20an de julio) okazos nur ekskurso al etnografia vilaĝo Dargaičiai. Kiuj ankoraŭ ne ricevis la pagitan sumon pro nuligo de la mendita ekskurso, bonvolu turniĝi al la respondeculo pri la ekskursoj.

### Jam retlegeblas "SAGISTO"

Ĉiutaga informilo de BET-43 jam legeblas en pdf-dosiero en la retejo de Litova Esperanto-Asocio: http://www.esperanto.lt. La konkreta retadtreso estas http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET43. Tamen la dua numero ankoraŭ ne estas enmetita, sed baldaŭ aperos.

### Libroservo

Ĉi-foja BET havas tre bone lokitan Libroservon. Ĝi troviĝas tuj vidalvide al la registrejo kaj funkcias je 09:00-12:00 kaj je 14:00-22:00. Deĵoras Loreta ŠUKAITYTĖ. Tie aĉeteblas ne nur libroj en bona prezo. *Bonvenon al la Libroservo!*



### El la redakcio

La redakcio kolektas viajn kontribuojn per retadreso: ds@esperanto.lt aŭ en la redakcia kaj la organizkomitata ĉambroj.

Viaj raportoj, anoncoj kaj similaj por la venonta numero estu transdonitaj al la redakcio plej malfrue **je la 12a horo de la kuranta tago**. Ĉi tiun numeron redaktis CHOE Taesok.

## KONCIZA HISTORIO DE BET

Jen estas la konciza historio de BET en Litovio. La unua BET (komence ĝi nomiĝis tendaro) okazis en 1959 ĉe la lago Baltezers apud Riga. Estis decidite ĉiujare organizi similajn renkontiĝojn laŭvice en tri baltaj respublikoj: Estonio, Latvio, Litovio.

Dum sovieta tempo estis malfacile organizi BET-ojn kaj dum la jaroj 1973 kaj 1979-1982 pro diversaj obtakloj ili ne povis okazi. Entute en Litovio BET-oj okazis kiel sube (parenteze, nombroj de la partoprenintoj):

1961 en Molėti (204)
1964 en Veisiejai (153)
1967 en Vilnius (337)
1970 en Kretinga (316)
1976 en Veikšniai (241)
1983 en Noreikiškės (358)
1986 en Smalininkai (472)
1989 en Noreikiškės (580)
1992 BET ne okazis, ęar en Kaunas
okazis 75a SAT-Kongreso (617)
1995 en Girionys (240)
1998 en Noreikiškės (386)
2004 en Birštonas (257)
2007 en Šiauliai (ĉ. 300)



**Danke al Esperanto homoj povas tiel pasigi sian maljunaĝon en elkora ĝojo kaj interpopola amikeco.**



**Espereble, ili festos la centjaran jubileon de BET. Infanoj el Latvio kaj Litovio.**